

BULGARA

12 • 1981

ESPERANTISTO



ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

Feliĉan Novan Jaron!





BATALANTO POR PACO KAJ MALARMADO

Dum la ĉi-jara sesio de la Ĝenerala asembleo de UNO la sovetaj registaro proponis ke ŝtatestro, kiu unua ordonos atakon per nukleaj armiloj, estu deklarita malamiko de la homaro. Tiu ĉi propono celas forigi la minacon de nuklea milito.

En la intervjuo, aperinta en gazeto „Pravda“, Breĵnev deklaris, ke la sovetaj gvidantoj ne interŝanĝas pensojn pri „limigita nuklea milito en Eŭropo“, sed pri malebligo de tia milito. Ĉiu, kiu imagas, ke estas eble limigi la nuklean militon nur en Eŭropo, estas danĝera fantaziulo. Ja similaj ŝtatestroj ekzistas en la kapitalista mondo. Nur antaŭ 2—3 monatoj la usona prezidanto decidis, ke oni produkti 1180 neŭtronajn bombojn kaj 800 kuglegojn por atomaj kanonoj.

La usonaj imperiistoj ne deziras rekonigi la realaĵojn en la mondo, ne povas toleri la socialismajn landojn. Depost la Dua Mondmilito la militstabo de l'usona armeo ellaboris kelkajn planojn por frakasi Sovetunio kaj la ceterajn socialismajn landojn. En 1945 oni planis ataki per nukleaj bomboj 20 industri-centrojn en Sovetunio; en 1949 la atakotaj centroj fariĝis jam 196. Nun oni parolas pri „limigita milito“ en Eŭropo, por tiamaniere nenigligi siajn konkurantojn en Okcidenta Eŭropo kaj la socialismajn ŝtatojn.

Tamen la popoloj ne atendas simile al ŝafgregoj sian pereon. En Federacia Respubliko Germanio, Britio, Francio, Italio, Skandinavio la popoloj partoprenis amasajn demonstraciojn, protestante kontraŭ la malhumanaĵoj de l'usonaj imperiistoj.

En sia lasta intervjuo en „Spiegel“ L. Breĵnev deklaris, ke „limigita milito“ estas absurdaĵo. Jam ĉe la unua nuklea atako eksplodis tutmonda atommilito, kiu neniiĝos la vivon sur la terglobo. Anstataŭ plani militon, pli bone estus honeste kaj sincere interparoli pri malarmado.

En la intervjuo Leonid Breĵnev apelacias al ĉiuj politikuloj ne amasigi neniligajn armilojn, sed zorgi pri likvido de la jam fabrikitaj, pri malpermeso de la nukleaj armiloj ĝenerale.

Liaj eldiroj montras al la homaro la vojon al malarmado, al likvido de la lokaj konfliktoj, montras la vojon al eterna paco en la mondo.

Al Leonid Breĵnev — la granda batalanto por paco kaj paca kunvivado, ni tute deziras sanon kaj longan vivon por la bono de la homaro.

Inter la ŝtatviroj de la mondo Leonid Breĵnev sendube estas unu el la plej ŝatataj kaj popularaj.

Kun granda simpatio la popoloj festas lian 75-jariĝon. Ankaŭ ni esperantistoj esprimas al li nian estlimon kaj simpatian, ĉar interalie li faris multon por vigligo de la Esperanto-movado en USSR.

Depost 15 jaroj Breĵnev estas ĝenerala sekretario de la Komunista Partio de Sovetunio (KPSU) kaj sur tiu posteno li fidele efektiviĝas la testamentojn de Lenin.

Antaŭ ol fariĝi ĝenerala sekretario de KPSU, li havas longan laborbiografion. Inĝenero laŭ profesio, depost 1938 li okupis gvidpostenojn en Ukrainio, en la Rusa federacio, ĉe la kultivado de greno en Siberio ktp.

Dum la Dua Mondmilito li estis estro de la politika fako de IV Ukraina fronto. Multaj el ni legis liajn rememorojn „Malaja zemlja“ („Malgranda tero“), en kiuj li priskribas kiel la sovetaj armeo kontraŭbatalis la hitlerajn armeojn en la Antaŭkaŭkaza regiono kaj la sinoferecon de la sovetaj soldatoj.

En la batalvicoj de IV Ukraina fronto Leonid Breĵnev marŝis laŭ la montvojoj de Karpatoj kaj partoprenis la liberigon el faŝista jugo de la popoloj de Ĉeĥoslovakio.

Estante elstara gvidanto de la sovetaj popoloj, Leonid Breĵnev gajnis la korojn de ĉiuj pacamaj homoj sur la tero. Ĉiutage Breĵnev dediĉas tempon al la pacproblemoj. Oni volonte subtenas liajn pacproponojn.



BULGARA ESPERANTISTO



ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO • № 12, DECEMBRO 1981, JARO 50

ĜOJIGA BILANCO

ĤRISTO GOROV,
prezidanto de BEA

Elruliĝis ankoraŭ unu jaro. Ĝi estis rimarkinda per iuj gravaj eventoj, kiuj altiris la atenton de la ekstera mondo. Unualoke — la Dekdua kongreso de Bulgara Komunista Partio, kiu pritaksis la faritan laboron kaj skizis la taskojn por la antaŭstaranta kvinjara periodo. Sekvis la 90-jara jubileo de la fondo de la Partio. Brilanta jubileo estis la 1300-a datreveno de la fondo de la bulgara ŝtato.

Nia asocio ne flankestaris. Ni aligis al la naciaj arangoj per pluraj aktivecoj. Estis kunvokita plenkunsido de CE de BEA, kiu akceptis kompleksan planon por agado ĝis la 41-a kongreso en 1984. Niaj aktivecoj energie kaj senlace laboris. Unualoke ni menciis la aktivecojn en urbo Ŝumen, kiuj organizis la Nacian Scienc-praktikan Konferencon, dediĉitan al la 1300-jara jubileo. Ĝin partoprenis multaj sciencaj laboristoj kaj ĉirkaŭ 200 aktivecoj el diversaj urboj kaj vilaĝoj. Sekvis la Tria Internacia Medicinista Konferenco en Ruse, organizita de la medicinista sekcio kaj dank'al la kunlaboro de la Distrikta estraro de BEA en Ruse. En ambaŭ arangoj partoprenis esperantistoj el aliaj landoj.

Menciindaj estas ankaŭ la turneoj, kiujn efektiviĝis en USSR, GDR kaj Hungario artistoj el la sekcioj de Muzika Esperanto-Ligo kaj Bulgara Esperanto-Teatro. Ili prezentis spektaklojn en Moskvo, Leningrado, Kievo kaj Tallin, en Berlino, Drezdeno, Budapeŝto, Pecs, Szombathely, Békéscsaba kaj Nyiregyhaza. Ankaŭ la geknaboj-aktoroj el urbo Burgas donis spektaklon antaŭ pioniroj en Hungario. La konataj kantistoj Maria Angelova kaj Veselin Damjanov donis koncertojn en Italio kaj FRG. Amase vizitita estis la festivalo de amatora arto en urbo Pazarĝik. Junaj talentuloj prezentis majstroverkojn de diversaj artoj. Kun tri premioj revenis el Zagreb la pupteatro el urbo Kargali.

Multo estas farita en la organiza kaj kultur-kleriga agado. En ĉiuj distriktoj okazis plenkunsidoj, en kiuj oni kritike pritaksis la faritan laboron kaj skizis novajn taskojn por la antaŭstaranta periodo. Dum la aŭtuno komencis funkcii dekoj da kursoj por komencantoj kaj progresintoj. Estis organizitaj seminarioj por instruistoj, esperantologoj, ĝejunuloj ktp. Tie oni interŝanĝis sperton kaj riĉigis siajn konojn en diversaj sferoj de la agado de BEA. Pli regule kaj pli belaspekte aperas la asocia organo „Bulgara Esperantisto“. Kelkdekoj de ĝiaj plej aktivaj kunlaborantoj partoprenis la Teori-praktikan Seminarion en Plovdiv en oktobro j. k. kaj faris utilajn rekomendojn por plibonigo kaj variigo de la enhavo de „BE“. Belaspekta, riĉe ilustrita estas la nova numero de „Bulgarino“. Aktive laboris la sekcioj de medicinistoj, fervojistoj, pedagogoj kaj de Mondpaca E-movado. Ĉi-lastaj kolektis kelkilojn da subskriboj por malarmado kaj por konservado de la paco.

Unuvorte, ni atingis bonajn rezultojn, sed tio ne signifas, ke ni povas ripozi sur la laŭroj. Antaŭstaras seriozaj taskoj dum 1982. En la vintraj monatoj okazos la raporteblaj kunvenoj de la societoj kaj distriktaj organizoj, kie oni en kamaradeca atmosfero pridiskutos la rezultojn de sia laboro, elektos novajn estrarojn, celante atingi pli altan nivelon en la societa agado.

La enkonduko de Esperanto en mezlernejoj starigis seriozajn taskojn antaŭ la asocio kaj ĝia instruista sekcio. Ĝi devas varbi kaj pliperfektigi dekojn da pedagogoj, kapablaj instrui la lingvon al geknaboj.

La ĉefa atento de la aktivecoj estos direktita al la Internacia seminario pri la 100-jara naskiĝtago de Georgi Dimitrov, kiu okazos en la komenco de junio 1982 en Sofio. Alia grava arango estos la 75-jara jubileo de BEA,

kiu okazos en oktobro en urbo Veliko Tarnovo, kie en 1907 oni metis la fundamenton de Bulgara Esperantista Asocio. Jam estas invititaj el fremdlando artistoj kaj amatoroj por partopreni la recitalojn je la nomo de naciaj poetoj Hristo Botev kaj Nikola Vapcarov. Centoj da gejunuloj preparas sin por la festivalo de la amatoraj artoj, kiu okazos komence de aprilo en la historia urbo Pleven.

La vera patriotismo postulas de ni amon al nia patrujo. Tio tamen ne sufiĉas. Ni devas esti modelaj laboruloj. Ĉiu el ni devas kontribui por la triumfo de la matura socialisma socio. Ja ĉiu sukceso sur la vojo al matura socialismo estas sukceso ankaŭ por la Internacia Lingvo. Ju pli bonstata estos nia lando,

des pli riĉa estos nia asocio kaj disponigos pli da rimedoj por propagando de nia nobla afero, por stabiligo de la interrilatoj kun la ekstera mondo. Jen kial la verda stelo devas esti signo ne nur de paco kaj amikeco, sed ankaŭ de modela laboro por nia patrujo.

Al ĉiuj, kiuj kontribuis por realigo de la iniciatoj de BEA kaj por plibonigo de nia laboro ni esprimas nian dankon.

Ni kore dankas al ĉiuj bulgaraj geesperantistoj kaj al ĉiuj eksterlandaj niaj amikoj, kiuj multon faris por popularigo de nia lando kaj de niaj sukcesoj en la disvastigo de Esperanto.

Estu fruklodona la Nova 1932 jaro!

La socialisma demokratio — historia akiraĵo de la bulgara popolo

La 4-an de decembro ni festas kiel tagon de la Konstitucio kaj de la juristoj. Tiun ĉi tagon, en 1947 jaro, la Supra Parlamento akceptis la unuan Konstitucion de Popola Respubliko Bulgario. Tiukaze ni publikigas la artikolon de K. Jotov, kiu traktas iun el la plej gravaj akiraĵoj de la bulgara popolo post la Naŭa-septembra revolucio 1944 — la socialisman demokration

• • •

La 13-jarcenta historio de Bulgario konsistas el vico da eventoj kaj bataloj por konfirmo de la bulgara ŝtato, de la bulgara nacio kaj de la demokratio.

En daŭro de 37 jaroj Bulgario nerekoneble ŝanĝiĝis. Brila ekzemplo pri tio estas la senĉesa evoluo kaj progreso de la socialisma demokratio.

La komunisma socio, kiun nia popolo nun konstruas, kvalite ege diferencas de la ĝin antaŭantaj socioj. Konservante kaj perfektigante la plej demokratiajn formojn kaj tradiciojn, kreitajn dum la 1300-jara ekzistado de la bulgara ŝtato, samtempe ĝi kreas kvalite novajn demokratiajn instituciojn, formojn kaj tradiciojn, proprajn nur al ĝi.

Jen estas la ĉefa trajto de la demokratio kiel soci-politika sistemo por direktado de nia socio: ĝi disponigas al la laborista klaso en alianco kun ĉiuj aliaj laboruloj ne nur la ŝtatan regpotencon, sed ankaŭ ĉiujn sociajn riĉaĵojn. Jam en la unuaj tagoj post la revolucio je la 9-a de septembro 1944 tiuj, kiuj dum jarcentoj estis subpremataj kaj ekspluatataj, estigis mastroj de la popola riĉaĵo, aktivaj partoprenantoj en la gvidado de la nova socio.

Reala demokratio estas nur tie, kie ne ekzistas ekspluatado. Ekonomia bazo de nia demokratio estas la socia poseda de la produktadrimedoj, ĝia socia bazo — la nerompebla alianco de laboristoj kaj vilaĝanoj

kaj politika bazo — la idea-politika unueco de la popolo.

La kontraŭuloj de l' socialismo asertas, ke la demokratio devige premisas la ekziston de politika opozicio, de interpartiaj bataloj.

En nia socio tamen ne estas objektivaj kaŭzoj por ekzistado de opoziciaj partioj. Ĝia ekonomia bazo estas centrigita, komunaj estas la interesoj de la tuta popolo. Subjekto de la regado, portanto de la regpotenco en nia socio estas la tuta popolo. Sub la gvidado de la Bulgara Komunista Partio efektiviĝas la socia direktado de ĉiuj procesoj.

La enhavo de la socialisma demokratio kaj ĝia plua disvastigo kaj perfektigo estas organike ligitaj kun la ĉiufanka kresko de la socia aktiveco de la popolo. La procedo de konstruado de la evoluanta socialismo edukas en ĉiu kolektivo kaj individuo neceson pri aktiva kaj respondeca partopreno en solvado de la sociaj problemoj.

Ekskluzive grandan signifon havas la referendumoj, ekzemple por akcepto de la Konstitucio de Popola Respubliko Bulgario en 1971, la senpera partopreno en la direktado de la produktado. Amasa formo de senpera demokratio estas la popola kontrolo.

La rekta reprezenta demokratio trovas klaran esprimon en la praktiko: la formado de la reprezentaj organoj kaj ilia agado estas tuta-popola afero.

La socialisma demokratio ne estas io konstanta, ĝi evoluas. La politiko de la komunista partio kreas plej favorajn eblojn por grava pliriĉigo kaj plivastigo de la enhavo de l' socialisma demokratio.

K. JOTOV

75-JARA JUBILEO DE LA E-SOCIETO EN STANKE DIMITROV

Pasis 75 jaroj depost la fondiĝo de la Esperanto-societo en urbo Stanke Dimitrov. En 1905 la helpkuracisto Dimitar Vodeničarov alportas en la urbon (tiam nomatan Dupnica) la unuan lernolibron de Esperanto, kies aŭtoro estis la kreinto de la Internacia Lingvo, d-ro L. L. Zamenhof. Pri lernado de la lingvo tuj okupiĝas ankaŭ du liaj samurbaranoj — Aleksandar Sakelarijev kaj Todor Miĵorov. En la sekvanta jaro estas organizita la unua kurso de Esperanto. La finintaj ĝin kursanoj fondas Esperanto-societon „Sun“, kiu disvolvas viglan kulturklerigan agadon: oni organizas kursojn por ellerno de la lingvo, vesperamuzojn, distrajn aranĝojn, ekskursojn. Du jarojn pli malfrue la societo havas mandolinorkestron, kiu koncertas en la urbo kaj en ĝia regiono. Laŭ iniciato de instruistoj kaj kulturagantoj en la urbo, en 1910 unuafoje en la historio de la lerneja instru-eduka afero en nia lando, en la knaba gimnazio en Dupnica Esperanto estas instruata fakultative, kio tre favore influas por la popularigo kaj pliamasiĝo de la movado. La Balkana Milito kaj la Unua Mondmilito ĉesigas la aktivan agadon de la societo, kiu restariĝas nur en 1922. Fervoraj propagandantoj de Esperanto en tiu tempo estas la instruisto de stenografio en la knaba gimnazio Ljuben Comakov, la direktoro de la knabina gimnazio Nikola Dodov kaj la instruanto de Esperanto Angel Temelkov. En la organizitaj kursoj por lernado de la lingvo enskribiĝas kuracistoj, instruistoj, metiistoj, oficistoj kaj kelkaj laboristoj. Sub la gvidado de Ljuben Comakov estas fondita Esperanto-societo de lernantoj kun pli ol 100 membroj. Laŭ ties iniciato en majo 1924 en la urbo okazas granda regiona konferenco de la lernantoj-esperantistoj el Sudokcidenta Bulgario.

La esperantistoj el la urbo kolektas rimedojn por helpo al la malsatantaj sovetaj civitanoj en Povolĵje. Tiu ĉi ago de amikeco kaj simpatio al la juna Soveta ŝtato plialtigas la aŭtoritaton de la societo kaj altiras novajn membrojn.

Nur tri monatojn post la Septembra kontraŭ-faŝista ribelo, la 23-an de decembro 1923 estas fondita la junulara Esperanto-societo „Rila verda stelo“, kies membroj estas progresmaj gejunuloj. En tiu tempo la veterano de la E-movado, la honora prezidanto de MEM, la heroo de socialisma laboro Nikola Aleksiev estas lernanto en la lasta klaso de la gimnazio en Dupnica kaj aktivulo de la societo. Spite al la teroro de la po-

lico ĝia gvidkomitato organizas ekskursojn en Rila-montaro, kursojn por ellerno de la lingvo k. a.

En 1930 en la domo de unu el la veteranoj de la E-agado Kosta Georgiev estas establita laborista Esperanto-societo en la urbo, kies fundamenta kerno estas laboristoj-fervojistoj. La laborista E-societo starigas al si la taskon labori por unuigo de la laboristoj ĉirkaŭ Bulgara Komunista Partio (BKP), propagandi la socialismajn ideojn inter la popolamasoj, aktive helpi la partion en ĝia batalo por renverso de la monarĥo-faŝisma diktaturo. Por tiu ĉi celo oni uzas diversajn formojn de la kultur-amasa laboro — vesperamuzojn, ekskursojn, kunvenojn, korespondadon kun esperantistoj el USSR, Francio, Germanio, Hispanio kaj aliaj landoj.

Tiu ĉi aktiva agado atente estas observata de la polico. La 25-an de junio 1933 estas arestitaj 14 laboristoj-esperantistoj, estas konfiskita la arkivo de la societo kaj en la faŝista tagjurnalo „Zora“ aperas jena sciigo: „En Dupnica estas malkovrita granda komunista konspiro.“ En daŭro de ok tagoj la arestitaj esperantistoj estas kruele turmentitaj. Pro manko de pruvoj kaj konfeso 10 personoj estas liberigitaj kaj 4 — Gavril Gavrilov, Asen Froloŝki, Kosta Georgiev kaj Nikifor Zaŝev — estas transdonitaj al la Sofia militprokuroro. Sed pro manko de pruvoj ankaŭ ili estas liberigitaj.

En la batalo kontraŭ la faŝismo kaj kapitalismo la Esperanto-movado en la urbo donis karajn viktimojn. En junio 1944 en batalo kun faŝisma militistaro apud vilaĝo Eremija pereis la partizanoj-esperantistoj Ljuben Silegarski, Petra Lisičkova kaj Georgi Sokolov.

Post la venko de la socialisma revolucio en nia lando la societo renovigas sian agadon sub la nova nomo „Marek“. Aparte aktiva estas ĝia agado dum la periodo 1955—1981. Ĝiaj prezidantoj dum tiu ĉi periodo estas Boris Drenski, Boris Miĥajlov, Konstantin Tomanov, Hristo Terziev, Boris Tonĉev, Nikifor Zaŝev, Dina Sarakirova, Stojil Kolarov. Ĉiujare oni organizas kursojn por lernado de Esperanto. Tiel la ekzemplo de la plej bonaj reprezentantoj de la Esperanto-movado en la urbo kaj la longjaraj tradicioj transdoniĝas kiel testamento de generacio al generacio en la nomo de la ideoj pri socialismo kaj paca kunekzistado inter la popoloj.

DIMITAR KIROV,
viceĉefredaktoro de ĵ. „Dupniŝka
komuna“, Stanke Dimitrov



De la historio estas konate, ke en la mezo de la VII jc en la regionoj laŭ la malsupra fluo de Danubo ekzistis potenca militunuigo de sep slavaj gentoj, kiuj sukcese kontraŭstaris al la militpremo de Bizanco. En 681, kune kun la bulgara hordo de hano Asparuh ili kreis la slavbulgaran ŝtaton. La prabulgaroj estis liberamaj homoj, fortaj kaj eltenemaj militistoj. La frumezepoka aŭtoro Enodij skribas pri ili: „Tio ĉi estas popolo, ĉe kiu la batal-

„TIE ĈI ESTU BULGARIO!“

kampo disfamigas la gloron de l'praavoj, ĉar ĉe ili oni konsideras kuraĝulon tiu, kies sagoj estas pli abunde sangmakulitaj“.

Al la malproksima juneco de la bulgara ŝtato nin revenigas la monumenta kompozicio „Hano Asparuh“, konstruita en la suda parto de urbo Tolbuhin.

La monumento estas dediĉita al la 1300-jara jubileo de Bulgario. Ĝiaj aŭtoroj estas la popola pentristo prof. Veliĉo Minekov kaj arkitekto Ivan Nikolov. La majesta bronza figuro de hano Asparuh estas proksimume 15 m alta. Starante sur la piedingoj, en sia dekstra mano la hano tenas glavon, kies klingo pikas la ĉielon. Lia rigardo estas direktita al la ebenajo.

En la piedo de la rajdanto, sur malpli granda piedestalo staras kvin bronza prabulgaraj soldatoj — kun glavoj en la manoj ili triumfas post la venko super Bizanco kaj gloras hanon Asparuh. Kaj li kvazaŭ ĵus deŝiris sian rigardon de la forpasita vojo kaj plenvoĉe kriis: „Tie ĉi estos Bulgario!“

La plastika grupo „Hano Kubrat kaj liaj filoj“, „foliumas“ plian paĝon de la eventoj, antaŭantaj la kreon de la bulgara ŝtato.

La ĉirkaŭaĵo de la monumenta kompozicio estas severa kaj impona — granito kaj marmoro, akvokaskado, verdajo, arboj. . . La eterna fajro memorigas, ke tie ĉi estas la komenco de Bulgario.

La memorejo „Hano Asparuh“ apud Tolbuhin estas iu el la plej rimarkindaj verkoj de nia monumenta arto, glorigo de la unuaj kreintoj de la bulgara ŝtato.

LA MONDO SALUTAS BULGARION

E-societo „Aristo Kozlev“ en Polski Trambes sendis al multaj alilandaj kluboj kaj personoj multnombrajn materialojn pri la 1300-jara jubileo de Bulgario. Per ili, en diversaj partoj de la mondo la esperantistoj iniciatis kunvenojn kaj ekspoziciojn. Ili sendis interesajn informojn kaj fotojn pri la farito kaj pri la oficiala celebrado de la jubileo en siaj landoj. Kaj jen la rezulto — la aŭtentika ekspozicio „La mondo salutas Bulgarian. . .“

Pli ol 350 fotoj, gazetoj, invitiloj, afiŝoj kaj salutleteroj el 38 proksimaj kaj foraj urboj de la kvin kontinentoj! Unu nevidebla,

multnombra amikaro de Hiroŝima ĝis Havana, de norda Tampere ĝis namibia ĉefurbo Windhoek; de Otava ĝis Brisban etendas manon por esprimi simpatian al malgranda Bulgario.

Fakte la geamikoj el Samarkand sugestis nian iniciaton. Kaj tuj post nia cirkulera letero reagis pozitive 8 sovetaj urboj. Koran dankon! Al vi kaj al ĉiuj sekvantaj.

La malfermon de la jubilea ekspozicio en finnlanda Oulu partoprenis la ambasadoreja sekretario en Helsinki Vladimir Danĉev, en Tihvin—gvidantoj de ASE. En Nijnevartovsk

vizitis la entreprenon pli ol 15 000 personoj. En aŭstralia urbo Brisban la ekspozicion akceptis la salono de la Urba domo. La samarkandaj esperantistoj agis kune kun la Distrikta biblioteko, kun la distriktaj gvidantaroj de la Komsomolo kaj de la Uzbeka societo por amikeco. La ekspozicio en hispana urbo Hijon, dank' al nelacigebla Adonis Gonzalez, estis amase vizitata. Pri ĝi skribis la gazetoj „La Nueva Espana“ kaj „El Comercio“. Dank' al Lev Fiŝbejn kaj al aliaj sovetiaj geesperantistoj aperis artikoloj en kelkaj lokaj kaj distriktaj gazetoj. Pri la iniciativo de la esperantistoj en Uzlovaja disaŭdigis la televida stacio en Tula.

Johannes Windisch el Filderstadt (GFR) plezurigis nin per valorega dokumentaro pri la Tagoj de Bulgario. Solveig Edvardson el Stockholm pliriĉigis nian ekspozicion per speciala numero de la sveda revuo „Artes“, dediĉita al bulgara poezio. Claude Baudry el Parizo havigis al ni afiŝojn kaj broŝurojn pri la Semajno de la bulgara kinoarto, pri ekspozicio de bulgaraj pentristoj en Francio. D-ro Niiĉi Matano el Hiroŝima bondeziris al la bulgara popolo neniam travivi la sorton de lia urbo. Kaj ŝajne por substreki la bondeziron, la urbestro mem, s-ro Takeŝi Araki, sendis belegan albumon pri Hiroŝima — la detruita de la atoma bombo kaj la renaskiĝinta pacama nuntempa urbo. Saluti kaj bondeziris pacon kaj pluan prosperon geesperantistoj el Meksikio kaj Hindio, Aŭstrio kaj Nederlando, Italio kaj Luksemburgo...



La ekspozicio en Polski Trambes estis titolita „La mondo salutas Bulgarion“. Ni respondas: „Jes, ni ankaŭ salutas kaj dankas la esperantistan mondon, kiu ankoraŭfoje pruvis la forton de nia pacama armilo, la simpatio al pacama Bulgario, la fidelecon al nia kara, pacama idealo!“

ĤRISTO MANOLOV

SENFINA FESTO

Kiam la aviadilo forportis nin, kvar bulgariojn, reen al la patrolando, ni nomis nian ĵus finiĝintan turneon „senfina festo“. Dum dekkvin tagoj en la fino de oktobro Belka Beleva kaj Anani Anev — geaktoroj el Sofio, Galja Kostova kaj Jana Stanĉeva — kantistino kaj pianistino el Jambol, traveturis GDR kaj Hungarion por prezenti sian koncerton okaze de la 1300-jariĝo de la bulgara ŝtato. La programo konsistis el prelego pri nia historio, el kantoj kaj rakontoj de bulgaraj verkistoj. Okazis sep koncertoj, kiujn ĉeestis proksimume 700 geesperantistoj.

La organizo de nia restado flanke de E-klubejoj en GDR kaj en Hungario estis je plej alta nivelo. Vizitoj ĉe reprezentantoj de la Popola Fronto; interparoloj ĉe taso da kafo pri E-agado; vizitoj de teatraj spektakloj, de muzeoj, de historiaj monumentoj; ekspozicio pri la bulgara jubileo; intervjuoj por la lokaj radio-elsendoj — programeroj

antaŭ kaj post niaj koncertoj.

La fotoj el la belegaj albumoj memorigas al ni pri Berlino kaj Drezdeno, pri Budapeŝto kaj Pecs (Peĉ), pri Szombathely (Sombathej) kaj Nyiregyhaza (Njiredhaza), pri Bekeŝaba (Bekeŝaba).

La donacitajn al ni florbukedojn ni transdonis al niaj dommastroj por ornamu siajn domojn, kaj la floroj sur la donacitaj de ili hungaraj brodaĵoj ĉiam ornamu niajn domojn.

Mi ne kuraĝas menci apartajn nomojn, ĉar ĉiu kun kiu ni renkontiĝis, meritas esti nomita. Mi nur deziras esprimi nian elkoran dankon al la gesamideanoj de Esperanto-klubo en GDR kaj de Hungara Esperantista Asocio pro la favoraj eblecoj plenumi nian taskon kiel civitanoj de Popola Respubliko Bulgario, kiel membroj de BEA.

Dum la jubileaj tagoj de nia ŝtato ili donacis al ni tiun „senfinan feston“, kiu restos neforgesebla!

B. B.

Ĉ E F R A T O J

Nia grupo, konsistanta el kvar personoj — la geartistoj Maria Angelova, Dimitar Denčev, Mihail Zdravev kaj mi, preleganto kaj grupestro — havis la grandan ĝojon vidi la sovetan landon, renkontiĝi kun centoj da sovetaj esperantistoj, konatiĝi kaj persone amikiĝi kun dekoj de ili. En kvin urboj — Kievo, Leningrado, Tallin, Riga kaj Moskvo — ni havis specialajn kunvenojn-koncertojn, dediĉitajn al la 1300-jara jubileo de la bulgara ŝtato.

Cie — jam ĉe nia alveno ĉe flughavenoj aŭ fervojstacioj — nin atendis kaj frate salutis grupo da esperantistoj. Konigante al ni la urbojn, nin ĉiam akompanis simpatiaj samideanoj. Kaj fine ĉiuloke okazis la renkontiĝoj-koncertoj. Pri la historia vojo kaj nuntempa vivo de niaj lando kaj popolo, pri la heroaj bataloj por nacia sendependeco, libero kaj socia justeco; pri la kontribuoj de nia popolo al la tuthomara kultura trezoro; pri ĝia internaciismo kaj pachtato, samkiel pri la nuntempa stato de la Esperantomovado en nia lando mi rakontis per Esperanto-parolo kaj miaj samlandanoj — per kantoj kaj recitaĵoj en Esperanto kaj en bulgara lingvo. Ĉiam estis kantoj, ankaŭ ruslingve. La publiko (parte neesperantista) ĉie vigle aplaudis nian programon.

En kvar lokoj al nia programo aliĝis programeroj de lokaj esperantistoj: en Kievo bonege sin prezentis junula dramrondeto, gvidata de la energia prezidanto de la urba E-klubo Miša Lineckij; en Leningrado la profesiaj aktoroj Aleksandr Jovlev kaj Genadij Rudenko majstre prezentis fragmentojn el „Hamleto“ laŭ la traduko de Zamenhof; en Riga — per mallonga sceneto el puŝteatraĵo la intereson de la publiko provokis trupo de pupartistoj, kiuj ĉi-jare partoprenis la Festivalon de Puŝteatroj en Zagreb kaj gajnis premiojn; en Moskvo per siaj kantoj salutis la bulgarajn gastojn Galina Staneŝnikova. Cie la renkontiĝojn malfermis kaj prezidis elstaraj sovetaj esperantistoj: en Kievo — Ekaterina Majburova, prezidantino de la Ukrai-

nia filio de ASE; en Leningrado — S. Podkaminer, 80-jara veterano de la sovetaj E-movado; en Tallin — F. Eisen, prezidanto de la estona filio de ASE, eksa multjara ministro de la kulturo de Estona SSR; en Riga — Kalminš Ajvars, universitata instruanto; en Moskvo — Dmitrij Perevalov, prezidanto de la urba E-klubo kaj membro de Centra Estraro de ASE. En ĉiuj renkontiĝoj abundis ardaĵ manifestiĝoj de reciprokaj amikaj kaj frataj sentoj, de vigla intereso al niaj lando kaj libera popolo.

En ĉiu urbo ni estis oficiale akceptitaj de gvidaj funkciuloj de SSOD (Societoj de Amikeco kun Eksterlando), en kies kadro efektiviĝas la agado de ASE. En Moskvo nin akceptis k-do Saakov — estro de la fako pri kulturligoj de SSOD, kaj prof. d-ro Magmet Isaev, prezidanto de ASE. Ili konigis al ni la agadon de SSOD, kaj aparte la agadon de ASE. Ni same informis ilin pri la nuna aktiveco de BEA, insiste petante ilin helpi al la sovetaj esperantistoj, kiuj dezirus viziti Bulgarijon kaj partopreni ĉe ni E-festivalojn, recitalon de Botev, E-kursojn, laborbrigadojn ktp. Aparte ĝojigis nin la informo, ke en USSR baldaŭ aperos E-lernolibro, kaj ke la preparlaboroj por eldonado de altnivela kaj aŭtoritata revuo — organo de ASE — estas plu farataj.

Dudek tagojn tra Sovetio! Dudek neforgeblajn tagojn en kelkaj el la plej interesaj urboj de la granda frata lando! Ne eblas rakonti pri ĉiuj bonegaj sovetaj homoj kaj esperantistoj, kun kiuj ni persone amikiĝis dum tiuj dudek tagoj. Al ĉiuj ĉi homoj, kiuj diversmaniere helpis nin dum nia restado en Sovetunio, ni esprimas nian varman dankon. Kaj ni atendas ilin kiel karajn gastojn en nia suna patrujo. Ni estas certaj, ke ankaŭ per la ĉiam pli vastaj kaj pli intimaj rilatoj kaj kunlaborado inter la bulgaraj kaj la sovetaj esperantistoj fortiĝas kaj plue floras la vivokrea amikeco kaj frateco inter niaj popoloj.

Kunĉo VALEV

LETERO EL TOMSK

Siberia E-klubo en urbo Tomsk intencas organizi en majo 1982 porpaca ekspozicion. Unu el la standoj estos dediĉita al frata Bulgario kaj celos montri niajn historiajn kaj nuntempajn kontaktojn kaj amikecon tra la jarcentoj. Ni estos tre dankaj al vi, se vi helpas nin, sendante al la organizantoj de la ekspozicio salutleterojn, bildkartojn, afiŝojn, insignojn, revuojn ktp.

Adreso: 634041-SA Tomsk-41, a/k 261 Esperanto-klubo

LEIPZIG ATENDAS VIN

De la 12-a ĝis 14-a de marto 1982 la Internacia Fira Esperantista Renkontiĝo „IFER 82“ kunvenigos 120 diversnaciajn geesperantistojn. Je temo „Goethe-Faust-Leipzig“ la Organiza Komitato aranĝos enhavoriĉan atrakcian programon, interkonan vesperon, libro-bazon, danckonkurson, ekskursojn ktp. Aliĝilojn oni mendu ĉe: Kulturbund der DDR, Organiza Komitato de IFER, DDR — 7010 Leipzig, Käthe-Kolwitz-Strasse 115.

EN KRASNODAR — EKSPOZICIO DEDIĈITA AL BULGARIO

Viglaĵ estas la kontaktoj inter krasnodaraj esperantistoj kaj iliaj amikoj el frata Bulgario. Krasnodaranoj aktive korespondas kun esperantistoj el bulgaraj urboj Sofio, Gabrovo, Loveĉ, Stara Zagora, Bjala, Smoljan, Sumen, Veliko Tarnovo, ĝemelurbo Burgas k. a.

En septembro 1981 en la Domo de la Agantoj de Klereco en Krasnodar estis solene malfermita ekspozicio dediĉita al la 1300-jara jubileo de Bulgario. Ĉiuj prezentitaj materialoj estis ricevitaj de bulgaraj esperantistoj, inkluzive de CK de BEA.

En la ekspozicio estis prezentitaj plakatoj, revuoj, bildkartoj, pentraĵoj, fotoj, kalendaroj, poŝtmarkoj kaj aliaj materialoj pri la riĉa historio, kulturo, vivmaniero, arto, literaturo, kaj kutimoj de la bulgara popolo, pri ĝia atingoj en la konstruado de socialisma socio. La atenton de ĉiuj vizitantoj kaptis belegaj fotoj de antikvaj ormoneroj kaj or-

namaĵoj, senditaj al ni de niaj amikoj el la Distrikta Historia Muzeo en Burgas. Ne mankis prelego pri la historio de Bulgario kaj belarta programo.

En junio 1982 nia E-organizaĵo planas ekspozicion dediĉitan al la centjara datreveno de naskiĝo de unu el la plej eminentaj filoj de la bulgara popolo Georgi Dimitrov. Ni atendas amasan reeĥon de la bulgara esperantistaro. Bonvenaj estos ĉiuj materialoj en Esperanto kaj en bulgara lingvo pri la vivo, pri la revolucia kaj politika agado de G. Dimitrov.

Bulgaraj esperantistoj, bonvolu skribi al ni kaj vi trovos fidelajn amikojn! Nia adreso estas: SU — 35000 Krasnodar, p. k. 18, Esperanto-organizo, Sovetunio.

SERGEJ KOCARJ,
prezidanto de Krasnodara
E-organizaĵo

NOVAĴOJ PRI BULGARIO EL OMSK

Nia korespondanto el la malproksima sovetia urbo Omsk — R. I. Sikorskij informas nin pri larĝskalaj aranĝoj fare de omskaj geesperantistoj, dediĉitaj al la 1300-jariĝo de la bulgara ŝtato, kiuj estas nova atesto de longdaŭra amikeco inter bulgaraj kaj sovetiaj esperantistoj.

Dank'al la senditaj abundaj materialoj de nia samideano Hristo Manolov el urbo Polski Trambeŝ, en la klubejo de E-societo en Omsk estis aranĝita riĉenhava ekspozicio pri Bulgario, montranta ĝian historian vojon kaj la akiraĵojn de la bulgara popolo en la socialisma konstruado, kulturo, arto kaj scienco.

En sia numero de 19. 9. 1981 la ĉiutaga gazeto „Veĉernij Omsk“ publikigis tradukitan el „Bulgara Esperantisto“ (n-ro 6, 1981) artikolon „Gabrovo ridas“ de N. Janev sub

la titolo „Kiel Gabrovo estigis ĉefurbo de rido“. En la enkonduka noto de la redakcio oni legas: „Amuzaj rakontoj pri la loĝantaro de la bulgara urbo Gabrovo estas tre popularaj kaj oni ofte ilin legas en la rubrikoj „Humorajoj“ de diversaj eldonoj en la tuta mondo. Pro kio tiu urbo havas similan „ridindan“ gloron?“ La respondo de tiu demando sekvas senpere, klarigante, ke la plej malnova esperantisto en Omsk — R. Sikorskij havigis al la redakcio sian tradukon el la revuo „Bulgara Esperantisto“, kiu konigas al la legantoj la radikojn de la populareco de gabrovaj humorajoj. Kiel ilustraĵon la redakcio aldonas al la artikolo kelkajn tipajn gabrovajn humorajojn el la sama n-ro de „BE“.

Eble iuj el niaj omskaj gesamideanoj partoprenos la sekvantan Festivalon de la humuro en Gabrovo?

ALILANDAJ POŝTMARKOJ PRI BULGARIO

Iuj fremdlandaj poŝtadministracioj laŭ konvena maniero notas la 1300-jaran jubileon de Bulgario. Interesa estas la fakto, ke por la unua fojo la projektoj de poŝtfilatelaj dokumentoj estas komisiitaj al bulgara pentristo.

En Budapeŝto estis inaŭgurita propaganda filatela ekspozicio, dediĉita al la granda jubileo de Bulgario. Tiukaze la hungara

Ministerio de Komunikado preparos ilustritan koverton kaj specialan stampon, faro de popola pentristo Stefan Kanĉev.

Intertempe alvenis sciigo, ke en Meksikio okaze de la rimarkinda bulgara jubileo same estas eldonita serio de 3 markoj kaj bloko.

GEORGI IFANDIEV



KOLOMANO KALOCSAY

ZAMENHOFA BALADO

Kiam li antaŭ sepdek jaroj
l' Unuan Libron ekkareis,
kaj inter liaj okulharoj
grandguta ĝojolarmo mezis:
la Verk', por kiu li elspezis
junagajn ĝojojn, staris brile —
ekskanti al li tre necesis:
„Ho kor', ne batu maltrankvile!”

Kaj kiam, malgraŭ ĉiuj baroj,
l' Afero kreskis kaj progresis,
kaj jam entuziasmaj aroj
en Bulonjo sur Mar' kongresis,
mirakla sento lin impresis,
kaj krii volis li jubile
(sed gorgopremo ne permesis):
„Ho kor', ne batu maltrankvile!”

Kaj en la tempo de l' amaroj,
kiam la mondo murdeksesis,
el homa sango kreskis maroj,
ĉiuj esperoj ŝajne ĉesis,
al koro, kiu tiel pezis
en brust' spiranta malfacile,
la lastan peton li adresis:
„Ho kor', ne batu maltrankvile!”

Vin mil mil langoj ne forgesis,
Majstro, sed ĝemas ni simile
nun, ĉar la mond' atomarmile
sin minacante refrenezis:
„Ho kor', ne batu maltrankvile!”

UNUJ E-ELDONOJ

(OKAZE DE LA TAGOJ DE E-LIBRO)

L. Zamenhof publikigis unuan libron de Esperanto la 26. 7. 1887 en la rusa lingvo en Rusujo. (Adam Zakrzewski. Historio de Esperanto. 1887—1912. 1913. 144 paĝoj, sur paĝo 10).

Por fondi esperantan societon en Rusujo estis necese ricevi permeson de cara cenzuro. La 24-an de marto (la 5-an de aprilo laŭ nova kalendarstilo) 1892 ministro de internaj aferoj konfirmis la regularon de la esperanta societo „Espero” en S. Peterburg, Rusujo. La 3-an (la 15-an laŭ nova kalendarstilo) de majo 1892 L. Zamenhof sendis telegramon: „Benitan komencon — kreskantan potencon — en floro kaj gloro — deziras el koro — Zamenhof”. (Adolf Holzhaus. Doktoro kaj lingvo Esperanto. 1969. 524 paĝoj, sur paĝo 277).

Ilja Davidoviĉ Ostrovskij en Jalta, Krimo, Rusujo, la 11-an de majo 1904 ricevis permeson de cara cenzuro eldonadi esperantan gazeton „Esperanto” en S. Peterburg, Rusujo. N-ro 1—2 de gazeto aperis en januaro de 1905 kaj n-roj 3—4 kaj 5—6, kiuj estis la lastaj, en februaro 1905. Entute aperis 3 numeroj. Ĉiu numero enhavis 24 paĝojn. Ĉiuj artikoloj devis esti presataj en la rusa kaj Esperanta lingvoj. Sur la paĝoj 4 kaj 5 de 1—2 numero estis presita letero (sen dato) de L. Zamenhof:

„Kun ĝojo mi salutas la unuan rusan gazeton, dediĉitan al la afero de la lingvo internacia Esperanto. Tiu ĉi gazeto aperis malfrue, tre malfrue. Sed pli bone malfrue ol neniam!”

La lingvo Esperanto naskiĝis en Rusujo kaj la unuaj lernolibroj kaj vortaroj estis eldonitaj en la lingvo rusa; tial ne estas mireble, ke ankaŭ la unuaj amikoj de tiu ĉi lingvo estis rusujanoj. En la unua serio de la esperantistoj, eldonita en la jaro 1889, inter 1000 adresoj oni apenaŭ trovis kelkajn dekojn da adresoj eksterlandaj — ĉiuj aliaj estis el Rusujo.

Oni devis tial antaŭvidi, ke ankaŭ la unua esperanta gazeto aperos en Rusujo. Sed kvankam la aŭtoro de Esperanto komencis klopodi pri tio ĉi jam en la jaro 1888, liaj penadoj ne havis sukceson. Pro diversaj kaŭzoj ne sole gazeto ne povis eliradi, sed ankaŭ la disvastigado mem de la lingvo Esperanto estis ligita sur ĉiu paŝo kun grandaj malfacilaĵoj. Kaj se malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj la afero de la lingvo ne pereis tuj en la komenco, tio venis nur de tio, ke la aŭtoro de la lingvo tiam estis ankoraŭ juna kaj havis ankoraŭ sufiĉe da energio, por ne perdi la kuraĝon kaj batali kontraŭ la malfacilaĵoj.

Tamen pli aŭ malpli frue tiu ĉi energio devis elĉerpiĝi. La materiala situacio de la aŭtoro jam de longe estis tre malbona kaj

en la jaro 1895 al la sola esperanta gazeto (kiu eliradis en Nurenbergo) en unu bela tago estis fermita la enirado Rusujon, kie ĝi havis pli ol duonon de siaj abonantoj.

Sed feliĉe al tiu tempo la afero de la lingvo Esperanto jam sukcesis fortiĝi en ekster-

lando. Jen tie, jen aliloke komencis aperadi varmegaj laborantoj, kaj iom post iom la tuta pezocentro de la esperanta afero transŝoviĝis eksterlanden (precipe Francujon).

(El letero de A. Holzhaus)

ENKETO PRI ESPERANTO

Antaŭ nelonge la DE de BEA en Haskovo kaj la loka E-Societo „Asen Zlatarov“ organizis enketon inter la neesperantistoj sub la nomo „Kion vi scias pri Esperanto?“ La celo de la enketo estas esplori la publikan opinion kaj la popularecon de la Internacia Lingvo Esperanto inter diversaj tavoloj de la loĝantaro en Bulgario.

Krome la iniciatintoj esperas post pristudo de la ricevitaĵoj respondi pli celkonforme fari sian noblan, senprofitan kaj althumanan agadon poresperantan. Por ke la respondoj al la 25 demandoj estu tute sinceraj, la enketo estas anonima.

Krom la ordinaraĵoj pri aĝo, sekso, klereco, socia rango kaj hobbio jen estas kelkaj el la plej interesaj demandoj:

„Ĉu vi scipovas paroli libere fremda(j)n lingvo(j)n? Ĉu vi estis en embaraso pro malkompreniĝo kun alilandano(j)? Ĉu la homaro

bezonas facilan kaj kompreneblan lingvon por interkomunikado? Ĉu kun la serenigo de la internaciaj rilatoj kreskos la bezono de unu internacia lingvo por interkompreno de la homoj en la mondo? Kie vi aŭdis aŭ legis unufoje pri Esperanto? Ĉu vi havas konatojn-esperantistojn? En kiu(j) sfero(j) de la homa agado povus esti aplikata Esperanto en la internaciaj rilatoj? Ĉu vi eklernus Esperanton, se vi scius pri E-kurso? Ĉu vi lernus Esperanton per la televido, se ĝi komencus elsendi tian kurson?“

La redakcio de „BE“ gratulas la esperantistojn el Haskovo pro ilia bona iniciato kaj bondeziras al ili sukceson en esplorado de la publika opinio, rezulte de kio ilia agado inter neesperantistoj verŝajne estos pli efika kaj fruktodona.

N. UZUNOV

ANEKDOTOJ PRI ZAMENHOF

MALSAĜULO AŬ KOMPATINDULO?

Foje Zamenhof vizitis kunvenon de kuracistoj. Enirinte la kunvenon, li preteriris du kolegojn, kiuj estis vigle interparolantaj. Unu el ili, ekvidinte lin, alvokis lin incite: „Jen nia mondplibonigisto!“ li moke diris. „Ni ĵus estis interparolantaj pri vi kaj via Esperanto. Ni demandas nin, kio verdire vi estas: ĉu malsaĝulo aŭ kompatindulo. Kion vi mem opinias pri tio?“

Zamenhof paliĝis kaj ruĝiĝis, sed cetere restis tre trankvila kaj tre digna. Starigante inter ambaŭ kolegojn, li respondis kviete, kun supera rideto: „En tiu ĉi momento mi, kredeble, staras inter ili.“

TUJA KAJ TAŬGA RESPONDO!

Zamenhof estis supreniranta altan mal-largan ŝtuparon. Subite alia viro venis de supre. Li prezkaŭ kunpuŝiĝis kun Zamenhof. „Kial vi ne iras flanken?“ kriis la viro. „Vi ja povas imagi, ke mi havas urĝan aferon.“ „Vi aperis tiel subite, ke mi ne vidis vin“, senkulpigis sin Zamenhof, „cetere vi povus mem flankeniri“. „Al stultulo mi ne cedas la vojon!“ insultis la viro kolere. „Sed mi des pli volonte“, diris Zamenhof kaj lasis la malgentilulon pasi.



Agado de lokaj E-organizadoj

SOFIO. La Urba estraro de Bulgara Esperantista Asocio kunsidis la 1-an de novembro 1981. En la tagordo de la plenkunsido estis gravaj punktoj, ligitaj kun la organiza laboro de la esperantistoj el la ĉefurbo — la plej kompakta unuo de la Esperanto-movado en Bulgario. Post la raporto de Hristo Kanev, prezidanto de UE de BEA en Sofio, dediĉita al la aktualaj taskoj, ligitaj kun la organizado de la raport-elekta kampanjo, al iuj organizaj ŝanĝoj en la Buroo de UE de BEA, kaj de Marin Marinov, sekretario de UE de BEA en Sofio, pri la plenumo de la financa plano dum la jam pasintaj naŭ monatoj, okazis viglaj pridiskutoj.

Kun aparta zorgemo la delegitoj de la plenkunsido aprobis la linion de UE de BEA koncerne la decentraligon de la Sofia E-societo „Maksim Gorki“ kaj la kreon ankaŭ de E-societoj en apartaj regionoj de la ĉefurbo, kiuj eklaboru pli intime kun la estraroj de la patrolandfrontaj organizoj laŭloke. Tio nepre ebligos pli sukcese solvi kelkajn problemojn lige kun la disvastigo de Esperanto en lernejoj, en entreprenoj kaj oficoj kaj alproksimigos la Internacian Lingvon al la ĉiutagaj bezonoj de la loĝantaro pri pli vasta informado ktp.

La plenkunsido aprobis vastan programon pri plenumo de la Kompleksa Programo de CE de BEA dum la sekvonta kvarjara periodo. Krome ĝi elektis la ĝisnunan sekretarion de s-to „Maksim Gorki“ Zora Oŝanska kiel sekretarion de UE de BEA en Sofio kaj samtempe liberigis de tiu posteno Marin Marinov, kiu fariĝis viceprezidanto de la Distrikta Estraro de BEA en Sofio.

HAIM LEVI

SMOLJAN. Fine de oktobro 1981 en la Internacia E-Kursejo en Pisanica okazis plenkunsido de DE de BEA en Smoljan. Ĝin partoprenis ankaŭ la estrarano de UEA Petar Todorov, viceprezidanto de BEA kaj Vasja Cvetkova, sekretario de IEK, kiuj antaŭ

la komenco de la plenkunsido rakontis pri siaj impresoj de la 66-a UK de Esperanto en Brazilo kaj prezentis kolorajn diapozitivojn, faritajn dum la kongreso.

En la raporto de DE de BEA en Smoljan estis skizita la unujara agado de la mez-rodopaj esperantistoj. Unualoke oni menciis la 18 E-kursojn kun pli ol 300 partoprenantoj de unua kaj dua grado, organizitajn de la E-societoj en Instruista Instituto „Diĉo Petrov“ kaj en la tri kvartaloj de Smoljan, en Rudozem, Madan, Varbina, Zlatograd, Nedelino, Cepelare, Dospat k. a. urboj de la distrikto. Oni konstatis, ke estas multaj dezirantoj lerni la Internacian Lingvon, sed mankas sufiĉe da kvalifikitaj diplomitaj instruistoj de Esperanto. Esperantaj amatoraj arttrupoj el Smoljan, Rudozem kaj Madan sukcese viciĝis je unua kaj dua lokoj en E-festivaloj, okazintaj en Loveĉ kaj Pazargik ĉi-jare. Jam trian jaron la Kino-Foto-Klubo „Eŭridika“ ĉe DE de BEA en Smoljan per siaj fotoekspozicioj kaj filmoj gajnas premiojn de distrikta, nacia kaj internacia festivaloj. Oni parolis ankaŭ pri la kreskantaj internacia E-korespondado, abonigo de E-periodaĵoj, partopreno en internaciaj E-laborbrigadoj k. a.

Dum la plenkunsido estis pridiskutitaj kaj aprobitaj la taskoj de la estonta agado en la distrikto. Interalie estis planitaj organizado de 35 E-kursoj kun 600 gekursanoj (el kiuj 200 fakultative lernantaj en lernejoj); 500 abonoj al revuoj „BE“ kaj „Paco“; la nombro de la korespondantoj kun alilandaj e-istoj kresku al 320 personoj, la membraro de E-societoj en la distrikto de Smoljan kresku al 800 esperantistoj; oni komencu la reeldonon de bulteno „Globo“; la membroj de Bulgara E-Kooperativo kresku al 150 personoj kun komuna kapitalo de 20 000 levoj.

La partoprenantoj en la plenkunsido transrigardis la artan ekspozicion de la kuracisto-esperantisto d-ro Strezov.

[MARIA DIČEVA

PROFESORO L. RALĈEV — 70-JARA

La 28-an de oktobro, j. k. societo „Maksim Gorkij“ — Sofio, festis la 70-jaran jubileon de prof. Lazar Ralĉev, esperantisto-veterano. Lian koncizan biografion kaj lian fervoran agadon de esperantisto prezentis al la kunveno k-do Boris Popov — proksima amiko ekde junaĝo de la jubileulo.

Prof. Ralĉev naskiĝis la 28-an de julio 1911 en Teteven en malriĉa familio. Apenaŭ 14-jara, li lernis Esperanton. Persekutata pro liaj progresemaĵoj, ofta vizitanto de arestejoj kaj prizono, Ralĉev devis vagi de urbo al urbo por daŭrigi sian klerigon: Televen, Lukovit, Svištov. En ĉiuj urboj li gvidis kursojn de Esperanto, fondis Esperanto-societojn kaj estis ilia prezidanto. Li finis siajn studojn en la Mezgrada Lernejo pri Komercio en Svištov kaj daŭrigis siajn superajn studojn pri ekonomiko en la Libera Universitato en Sofio.

Inter la jaroj 1935 kaj 1944 k-do Ralĉev oficis en la Bulgara Agrikultura Kooperativa Banko.

Membro de Bulgara Agrarana Unuiĝo, li multon faris por ĝia orientiĝo maldekstren. En sia verko „Ordo de la devo“ k-dino Cola Dragojĉeva substrekas lian aktivan helpon kaj kunlaboron al la fondo de la socia organizaĵo „Patrolanda Fronto“.

Post la 9-a de septembro 1944 li estiĝis sinsekve prezidanto de la Bulgara Banko pri Investado, de la Bulgara Nacia Banko kaj de la Centra Kooperativa Unuiĝo.

En 1954 prof. Ralĉev estiĝis lektoro en la Supera Instituto pri Komercio en Svištov, kies edukito, cetere, li estas.

Pro liaj meritoj en la sfero de la bulgaraj scienco kaj ekonomiko, la Stata Soveto de PR Bulgario distingis lin per pluraj altaj titoloj kaj ordenoj: „Kandidato de ekonomicaj sciencoj“, „Cirilo kaj Metodij“, „Por popola libereco“, „Naŭa de Septembro“, „Popola Respubliko Bulgario“ k. a.

Lia okupiteco de elstara sciencisto kaj socia aganto fortrenis lin de nia movado. Li tamen neniam ĉesis labori unuope por ĝi, deklarante ke „ankaŭ la unuopa soldato estas soldato“.

Je la fino de la jubilea solenaĵo k-do Dimitar Papazov, sekretario de BEA, crnamis lian roverson per la ora insigno de la Asocio. Al la jubileulo estis oferitaj valoraj donacoj.

Fine prof. Ralĉev dankis per kortuŝaj vortoj al la ĉeestantoj, kiuj, celebrante lian jubileon, revenigis lin al lia juneco. Profunde emociigita pro la estimo, manifestita al li en tiu ĉi solena vespero, interalie li diris: „En mia aĝo, simile al nia Majstro, mi sentas la nepran bezonon menci ian belsonan version: „Ho, mia kor’, ne batu maltrankvile!“.

Komparante la iaman movadon kun la hodiaŭa, prof. Ralĉev, diris: „Mi permesas al mi en „La vojo“ ŝanĝi la gramatikan ostempon en preteriton. „Ni, paŝo post paŝo, post longa laboro, atingis la celon en Gloro“.

K. DRAJEV

UNUA LANDA KONFERENCO DE BFES

La 10-11-an de oktobro j.k. en urbo Stara Zagora okazis Unua landa konferenco de bulgaraj esperantistoj-fervojistoj, organizita de Bulgara Fervojista Esperantista Sekcio (BFES) ĉe BEA.

Salutparolis Kr. Karucin — en la nomo de BEA, Elena Zlaĉevska kaj Slavi Janulov — en la nomo de la urba kaj distrikta estraroj.

La prezidanto de BFES k-do M. Marinov parolis pri la sukcesa partopreno de bulgara grupo de fervojistoj en la 33-a IFEF-kongreso en Germanio (Regensburg); li informis, ke la plej grava antaŭstaranta evento estas la 36-a kongreso de IFEF, kiu okazos en nia lando en 1984.

La sekretario de la sekcio Lili Koleva klarigis la kondiĉojn de aliĝo al la 34-a IFEF-

kongreso, kiu okazos en 1982 en Hungario, traŭgante la leteron de la Hungara Organiza Komitato. Krome, ŝi raportis pri la partopreno de bulgaraj fervojistoj-esperantistoj en la iniciatoj de BEA kaj pri la redaktado de la sekcia organo „Bulgara Fervojisto“.

Post la raportoj la ĉeestantoj pridiskutis la laboron de la sekcio. Multaj esprimis sian kontentecan pri la sekcia bulteno „Bulgara Fervojisto“, de kiu jam aperis du numeroj.

Fine, la prezidanto de la sekcio k-do M. Marinov, en la nomo de ĉiuj ĉeestantoj esprimis dankon al la urba societo „Fervojisto“ pro la bona organizo de la konferenco kaj pro la kora akcepto.

LILI KOLEVA

PRI LA TRADUKA LITERATURO

La reprezentaŭto de la redakcio Dimitar Mutuŝev renkontiĝis kun nia elstara esperanta poeto kaj tradukisto Asen Grigorov kaj interparolis kun li pri iuj problemoj de la traduka literaturo kaj pri lia krea laboro.

— *Kamarado Grigorov, jam pasis 20 jaroj depost la eldono de la libro „Bulgara Prozo“, kiun vi redaktis kaj estis unu el la tradukistoj. Kion vi povus diri al niaj legantoj koncernante kun la traduka laboro kaj viaj unuaj tradukoj?*

— „Bulgara Prozo“ estas relative ampleksa libro (252 paĝa), konsistanta el 19 rakontoj de la bulgara klasika kaj moderna prozo, kiujn tradukis 15 esperantistoj el Sofio.

Kiam la manuskriptoj estis pretaj, mi ilin adresis al mondaj alilandaj aŭtoroj kaj tradukistoj de la esperanta belarta literaturo: Julio Baghy kaj L. Somlay (hungaroj), D-ro Ant. Czubrynski (polo), Hilda Dresen (estonino), F. Faulhaber (nederlandano), Paul Thorsen (dano) kaj G. Zaljotov (ruso). Mi petis ilin helpi nin eviti slavismojn, resp. bulgarismojn, atingi plejeble altan nivelon de la Esperanto-sonado de la tradukoj.

Kunlaborado kun alilingvaj verkistoj kaj tradukistoj evidentiĝis tre utila kaj rezultodona.

Gis nun mia literatura laboro realiĝas precipe en redaktado. Escepton faras poeziaĵoj, kiujn mi plu ŝatas traduki. Fruktonoj estis por mi la periodoj, kiam mi redaktis revuojn „Bulgara Esperantisto“, „Internacia Kulturo“, „Nuntempa Bulgario“, „Interligilo“.

Miaj frutempaj tradukoj datiĝas de preskaŭ 60 jaroj, kiam mi, ankoraŭ junulo, aŭtodorekte lernis Esperanton. Mi tiam tradukis versaĵojn de la progresema bulgara poeto Nikolaj Rakitin. Ili aperis en „Bulgara Esperantisto“, kies redaktoro Atanas D. Atanasov — ADA min altiris kiel membron de la redakta komisiono de tiu ĉi revuo.

— *Bonvolu esprimi vian opinion pri la specifaĵoj de la traduko el bulgara lingvo en Esperanton.*

— Antaŭ ol komenci tradukadon de poeziaĵoj, mi unue studas kaj analizas la bulgaran tekston, rimarkas la ĉefajn plej gravajn elementojn kaj, aliflanke, la ne tiom gravajn vortojn, precipe adjektivojn, kiujn kelkfoje aŭtoroj uzas kiel farĉaĵojn. Foje ĉe pli komplikaj tekstoj mi tradukas la verkojn unue en prozon, kaj tiam alpaŝas al skulptado de la esperanta teksto, laŭ la reguloj de la poetiko, de la versa verkado kaj komponado. Tiam, por esprimi min figure, mi dronas en la esperanta versio, subiĝas al la leĝoj de Esperanto, kaj ne de bulgara lingvo. Krome, mi penas eviti kunaŭtoradon, ne permesas al mi „plibonigi“ la originalan versaĵon aldonante ion ajn, kion la aŭtoro ne skribis. Escepton faras la verso: Kun ĝi mi militas en la fama versaĵo „Kredo“ de Nikola Vapcarov. La aŭtoro ne verkis tiun version. Estas ja principo, ke tradukisto ne rajtas „kunaŭtoro“, „plibonigi“ la originalon. En venontaj eldonoj tiu ĉi „plibonigo“ devas forfali.

Gis nun mi tradukis centojn da versaĵoj kaj poemoj de bulgaraj poetoj, komencante per la patriarko de la bulgara literaturo Ivan Vazov kaj finante per junaj rekonitaj poetoj.

Tradukante versaĵojn, mi mobilizas miajn psikajn fortojn, antaŭscianta, ke por fari ekvivalentan tradukon de nacilingva poeziaĵo oni devas serioze kaj streĉe labori. El mia propra sperto mi konstatis, ke Esperanto estas lingvo mirinde taŭga por tradukado de poeziaĵoj. Por alpaŝi al tia respondeca laboro oni tamen devas havi du premisojn: altan lingvan preparecon kaj senton pri muziko, ritmo, rimo. Kun plej grandaj malfacilaĵoj mi kunpuŝiĝis ĉe tradukado de simplaj verkoj kaj strofoj. Ekzemple la traduko de infana versaĵo „Az sam bulgarĉe“ (Mi estas bulgarido) de Ivan Vazov prezentigis al mi kiel malfacile rompebla nukso.

— *Ĉu vi havas preferon al iuj aŭtoroj kaj kiujn iliajn verkojn vi preferas traduki?*

Laŭ mia firma konvinko, la tradukota verko devas esti bulgarlingva originalo. Oni ne devas traduki tekstojn, tradukitajn el alia lingvo. Tio nepre validas speciale pri versaĵoj. Alimaniere la tradukanto riskas nepermeseble malproksimigi la E-tradukon

disde la originalo. Due, oni devas traduki tiel, ke la E-teksto havu esperantan sonadon. Ĝi devas soni tiel, kiel ĝi sonas en la literatura heredaĵo de niaj klasikuloj: Zamenhof, Kabe, Baghy, Kalocsay, Schwartz, Nekrasov, H. Dresen, At. D. Atanasov k. a. Oni ne devas esti influata de la nacia lingvo.

Elektante verkojn, tradukistoj devas esti principaj. Bedaŭrinde kelkiam oni tradukas versaĵojn nur ĉar la aŭtoro estas ilia konato, amiko, parenco, aŭ por „lin varbi por nia lingvo“, kvankam li estas mezkvalita, ne postlasas spuron en la bulgara literaturo. Tiamaniere iuj tradukantoj misprezentas la bulgaran literaturon antaŭ la alilanda legantaro.

Tradukado estas arto, proksima al arto de verkado, tial pri tradukado devas okupiĝi persono, kiu ne nur perfekte posedas la lingvon, sed havas donitaĵojn, talenton de tradukisto.

Lastatempe mi tradukas versaĵojn sendaĵajn al mi de diversaj esperantistoj kaj ne esperantistaj kolektivoj en pluraj lokoj de Bulgario.

Mi rekomendas al niaj junaj poetoj kaj rakontistoj antaŭ ĉio konstante, sisteme atingi la nivelon de sia lingvoposedo. Oni povas havi donitaĵojn por la arto traduki, oni povas esti esperiga en tiu ne-facila laboro, sed sen alta posedo de Esperanto, sen sistema, persista laboro por perfekta ekposedo de nia mirinde bela lingvo, ili neniam povus fariĝi plenvoloraj tradukistoj kaj verkistoj.

Mi deziras al nia junularo transpreni la stafeton kaj atingi gravajn sukcesojn en la kampo de tradukado, konigi al alilandanoj la trezorojn de la bulgara literaturo. Per tio ili plenumos sian internacian kaj patriotan devon.

Asen GRIGOROV

APENAŬ, PENE. . .

Jen estas du vortetoj-martiroj, kiuj estas, nome, ofte malbone traktataj fare de esperantistoj kaj eble pleje ĉe ni, kie ekzistas du, preskaŭ same sonantaj vortetoj: една kaj една. Одна kaj една estas uzataj iom mikse kaj tiu mem miksaĵo transplantigis, evidente, en Esperanton. Tiu miksaĵo — ĉe ordinara prefero de „apenaŭ“ anstataŭ „pene“ — vidigas ankaŭ en la vortaroj: Esperanto-bulgara vortaro (1963), p. 32, sube: اپناؤ — اپناؤ legebla — който една може да се чете. (Kaj mi dirus senhezite: — „pene“ legebla (I. P.). — Ankaŭ en Bulgara-Esperanta vortaro, p. 135, dekstre: една, една. — I. Apenaŭ. Една мога да стана — ми اپناؤ povas stariĝi. (Kaj mi dirus senhezite: — Mi پنه. . . (I. P.). Ktp.

Serĉante voĵeton en la labirinto, mi alkuris je iuj konataj lingvoj kaj ankaŭ je miaj propraj alkutimiĝoj kaj sperto kaj devone mi konstatis, ke, unue, en la lingvoj, kie ekzistas du vortoj, „apenaŭ“ (-originala franclingva „à peine“) — една — Apenaŭ ni alvenis, ni devis ĉeesti je ceremonio (едва пристигнахме, трябваше да присъствуваме на церемонията) kaj, due, tie, kie ekzistas unu vorto, ĝi signifas aŭ „apenaŭ“, aŭ „pene“.

depende de la okazo, de la senco.

Kion signifas ĉi-diraĵo? — Ĝi estas la esenco de la tuto. En ĉiuj kazoj — kaj ĉe „apenaŭ“, kaj ĉe „pene“ — temas pri pli-malpli granda peno: Se пене pasis la tempo inter du agoj (kvazaŭ la dua laŭtempe ago пене ĝisatendis la finon de la unua, do, ĵus finiĝis la unua kaj la dua komenciĝis), ĝi estas la esenca uzo de „apenaŭ“. Se iu ago пене efektiviĝa(i,o)s aŭ ne efektiviĝa(i,o)s (en ĝenerala senco), sendepende de alia verbo, ĝi estas la esenca uzo de „pene“. Speciale pri „apenaŭ“, la uzo estas indikita en Plena Vortaro per ekzemplo de Zamenhof. „Apenaŭ“ ĉe unu frazo ne estas indikita kiel Zamenhofa uzo.

Je la fino, mi ŝatus stariĝi (al kiu?! . . .) la demandon: Ĉu oni rajtas aldoni pluan (novan) enhavon al esperantigita nacilingva vorto? — Mi mem ne kredas ĝin. Ja tiamaniere povas okazi dusencaĵoj. Ĉi-natura fuŝaĵo okazis je „à peine“, ĉe neglekto de „pene“. Kaj, nature, NE Zamenhof faris ĝin. Almenaŭ ne estas citaĵo, kiu konfirmas ĝin. — Dixi animumque levavi.

I. PETROV

KARAJ LEGANTOJ DE «BULGARA ESPERANTISTO»!

SE VI NE SUKCESIS ABONI VIAN ŜATATAN REVUON PERE DE «REP» (ŜTATA ENTREPRENO POR DISVASTIGO DE GAZETARO), VI POVUS FARI TION REKTE EN LA REDAKCIO — BUL. ĤRISTO BOTEV 97, 1303 — SOFIO, ĜIS LA FINO DE MARTO 1982. LA JARABONO ESTAS LA SAMA — 2,90 LEVOJ (AŬ EGALVALORO DE 5 USONAJ DOLAROJ EN NACIA VALUTO).

la fenomeno *Picasso*

(OKAZE DE LA 100-A DATREVENO DE LIA NASKIĜO)




Dum la jardekoj pasintaj inter la unua oleo-pentraĵo „Toreadoro sur ĉevalo“ de la okjara Pablo Ruiz Blasco, naskita la 25. 10. 1881 en Malaga, Hispanio kaj la lasta verko „Muzikisto kun gitaro“, kreita de la 92-jara Pablo Picasso, nelonge antaŭ lia forpaso (8. 4. 1973), la granda pentristo zigzagis prezkau inter ĉiuj pikturaj serĉadoj de nia jarcento kaj

dank' al siaj talento kaj genio estiĝis ilia plej elstara reprezentanto.

En la periodo 1901–1904 Pablo Ruiz, filo de instruisto de pentroarto, loĝis en Parizo sub la nomo Pablo Picasso. Por vivteni sin, li devis vendi siajn bildojn po unu franko al la artgalerio „Berta Veil“. Sialflanke la galerio vendis ilin po du frankoj. En 1905, dank' al la morala kaj materiala subteno de riĉaj mecenatoj, la mekanismo de lia populareco rapide ekfunkciis. Baldaŭ li kaj lia dua entreprenema edzino Jacqueline estiĝis posedantoj de du kasteloj, du somerrestadejoj kaj de la Banko „Picasso“. La prezoj de liaj verkoj atingis la neimageblan sumon de 1 600 000 frankoj (1967) kaj 12 000 000 da frankoj post lia morto (Tokio, 1980).

Se ni volas asimili iagrade la fenomenon kaj la labirinton Picasso, ni devas fari kelkajn ĝeneraligojn. Unue ni devas rekonii, ke li estis tre granda artisto, reganta la arton pentri, desegni, gravuri, skulpti, ceramiki. Vagante inter akademia realismo kaj modernismo, Picasso preferas pentri portretojn, mortan naturon, iagrade pejzaĝojn. En lia arto oni distingas tri ĉefajn periodojn: realismo, kubismo kaj ekspresionismo.



Fragmento de la pentraĵo de Picasso „Guernica“

Realismo. Akademia edukito, influita de la malnovaj hispanaj majstroj, Picasso estas vera realisto. Kaj tamen lia realismo estas fremda al la pikturaj procesoj de la epoko. En Parizo li bildigas la malriĉulan kaj bohemian mizeron (Blua periodo 1901—1904). Sub influo de Toulouse Lautrec kaj aliaj, la arto de Picasso akiras socialan nuancon. (Rozaj periodo, 1905—1909). Sub influo de Ingres, de la Pompeja kaj la renesanca pentroarto, kiujn li esploris en Italio, Picasso transiris al neoklasicismo. Li pentris elegantajn portretojn de sia edzino Olga Hohlova, de ilia filo Paul, la bildojn „Kamparana danco“, „La letero“, „La fluto de Pajno“ kaj mortan naturon.

Kubismo. (1908—1914). Gi estas logika sekvo de lia konatiĝo kun la sintezanta pentroarto de Paul Cezanne, kun la negra plastiko kaj de lia kunlaborado kun Georges Braque.

Ekspressionismo. La plej tipa periodo de

Picasso. Ĝi komenciĝis en 1907 per la bildo „La fraŭlinoj de Avignon“, per kiuj Picasso prezentas al la mondo arton, kiu kuraĝe reflektas la spiritalajn konfliktojn kaj maltrankvilojn de la homo.

En tiu ĉi piktura stilo li pentras siajn politikajn bildojn: „Songoj kaj mensogoj de Franco“, la freskon „Guernica“ (1937), „La murdoj en Koreo“ (1951) kaj „Milito kaj paco“ (1952).

Post la liberigo de Francio en 1944 Picasso estigas membro de la Franca Komunista Partio. Li forlasis Parizon por loĝi en la havenurbo Antibes, sur la bordo de Mediteraneo.

En la lastaj 20 jaroj de lia vivo li estas obsedita de la ideo laŭ „Picasso-maniero“ relabori la verkojn de la klasikuloj El Greco, Velasques, Cranach, Delacroix kaj Manet en plej impresionisma stilo. En 1958 Picasso revenas al Parizo por pentri en la ĉjo de UNESCO sian avertantan freskon „La morala falo de Ikaro“.

KIRIL KRESTEV

PETRO POLIŠČUK NE PLU ESTAS INTER NI...

Multaj esperantistoj ne nur el nia lando konas la energian kaj nelacigeblan sovetan esperantiston Petro Poliŝĉuk el Taŝkento. Antaŭ nelonge li estigis sepdekjarulo, sed estis plene konservinta la klarecon de sia menso, sian junulan petolemon, sian inklinon esprimi en strofoj la propran pozicion pri gravaj aktualaj problemoj. En dissemiĝita tra la gazetaro versoj li verve esprimis sian kredon en la fortoj de la progresema homaro, sian amon kaj sindonemon al la justa afero de l' Paco, sian malamegon al la militemuloj preparantaj novan mondmiliton. Li bone konis la militon, ĉar partoprenis la Patrolandan militon de la sovetaj popolo kontraŭ la invado de hitleraj armeoj en 1941. Li estis grave vundita kaj kvankam oni savis lin, li sentis la influon de la vundo dum la tuta resto de sia vivo. Kaj se tiu bonega patrioto kaj internaciisto, profunde konvinkita adepto de la sovetaj-bulgara amikeco, esperantisto kun fortaj amikaj sentoj ne plu estas inter ni, tio ankaŭ estas sekvo de la

militvundo, kiu malhelpis al li elteni ĉi-somere la du operaciojn, metintajn finon al la vivo de tiu homo kun vulkaneca karaktero.

En sia lasta letero al mi li skribis, ke estis invitita de William Auld kontribui per kolekto de versaĵoj al la literatura revuo „Fonto“. Mi responde instigis lin plenumi tiun peton de Auld. Versajne li ĉe ne sukcesis tralegi mian leteron, ĉar certe ĝi atingis Taŝkenton post la eksilentiĝo de lia poezia muzo...

La ĉarma amiko kun sprucantaj sinceraj sentoj, la brava defendanto de sia patrolando kontraŭ la „bruna pesto“, la esperantisto kun duonjarcenta esperantista staĝo, longjara prezidanto de la Esperanto-komisiono de Uzbeka societo por amikeco kaj kulturaj ligoj kun eksterlando, la ĉarma kaj ĉiam ridetanta „ĉiĉerono“ de ĉiuj esperantistoj vizitintaj Taŝkenton, lasis nin bedaŭri lian forpason.

Ni sekvu lian ekzemplon de arda pachtalanto!

NIKOLA ALEKSIEV



BONA KONSILO

Foje iun faman psikiatron vizitis mezaĝa paciento, kiu havis malĝojan mienon...

— Doktoro, mi suferas neŭrastenion. Nenio interesas min, nenio povas amuzi min.

— Jes, mi vidas, — respondis la kuracisto — oni devas restarigi ĉe vi la intereson al la vivo. Ĉu vi ŝatas bonajn manĝaĵojn?

— Ĉiu manĝaĵo naŭzas min.

— Kaj ĉu vi ŝatas la sporton?

— Ne, ĝi lacigas min.

— Do, entreprenu iun vojaĝon!

— Ho, nur ĉe la penso mem, ke mi devas eniri ekzemple tramveturilon, tuj obsedas min deziro memmortigi min...


Subite al la psikiatro venas savideo:

— Aŭskultu min amiko! — li diris. — Lastatempe en la cirko rolas neordinare komika klaŭno. — Li ridigas la publikon ĝis larmoj. Do, iru tien por vidi kaj aŭdi lin! Oni nomas lin Gibart.

Tuj la vizaĝo de la paciento plibonigis, li faris mirgrimacon kaj diris melankolie kaj kun bedaŭro:

— Gilbert, Gilbert, ja tiu mi estas!

Esperantigis: I. DRAGANOV



LESJA UKRAINKA

ĈERIZETOJ

Inter la folioj verdaĵ

Brilas ĉerizetoj.

Ĉerizetoj tiel logas

Etajn infanetojn.

Knabinetoj kaj knabetoj

Sur arbeto saltas,

Supren levas la manetojn

Kaj preskaŭ ne haltas.

Gojus beron tuŝi

Frandi ĝin enbuŝe,

Gojus ĝin deŝiri —

Ne povas akiri.

— Ĉerizetoj-merizetoj,

Ruĝaj kaj maturaj,

Kial kreskas tiel alte

Sur branĉoj susuraj?

— Tial ni elkreskis alte, —

Apenaŭ vidiĝas, —

Se ni kreskus ja malalte,

Ĉu ni maturiĝus?

El ukraina: NADJA ANDRIANOVA

Gonario estis la plej juna el sep fratoj. La gepatroj liaj ne havis monon por ke li vizitu lernejon. Tial ili sendis lin en iun grandan bienon. Gonario devis labori kiel timigilo por paseroj, peli la birdojn for de la agroj. Ĉiun matenon oni donis al li saketon da pulvo kaj Gonario tutan tagon devis vagi preter la agroj kaj de tempo al tempo pafi per iom da pulvo. La pafoj timigis la birdojn kaj ili forflugis.

Foje la pulvo ekbruligis la palton de Gonario kaj se la infano ne estis ĵetinta sin tuj en iun marĉon, li certe estus mortinta inter la flamoj. Gonario ĵetis sin en la akvon kaj timigis la ranojn. Ili ekkvakis kaj fuĝis, la bruoj, kiun ili faris, timigis la grilojn kaj la akridojn, kiuj por momento ĉesis zumi.

Sed plej timigita el ĉiuj estis Gonario, li ploris sola sur la bordo, malseka kiel malbela anasido, eta, ĉifonvestita kaj malsata. Li ploris tiel senespere, ke la paseroj surbranĉigis sur la apudan arbon por rigardi lin kaj ekpemis komplete, por konsoli lin. Sed la paseroj ne povas konsoli timigilon por paseroj.

Tio ne estas fabelo, sed vera okazintaĵo, kiu okazis en Sardinio.

ENHAVO

* * * Batalanto por paco kaj malarmado	11
Ĥristo Gorov. Ĝojiga bilanco	1
K. Jotov. La socialisma demokratio — historia akiraĵo de la bulgara popolo	2
D. Kirov. 75-jara jubileo de la E-societo en Stanke Dimitrov	3
* * * „Tie ĉi estu Bulgario!“	4
Ĥristo Manolov. La mondo salutas Bulgarian	5
Kuneo Valev. Ĉe fratoj	6
Kolomano Kalocsay. Zamenhofa balado	8
Adolf Holzhaus. Unuaj E-eldonoj	8
Organiza vivo	10
K. Drajev. Prof. L. Raĉev — 70-jara	11
Asen Grigorov. Pri la traduka literaturo	12
I. Petrov. Apenaŭ, pene	13
Kiril Kretev. La fenomeno Picasso	14
Nikola Aleksiev. P. Poliŝĉuk ne plu estas inter ni	15
Verdaj steletoj	16
Sporto: La bulgarinoj ravis ĉiujn	IV

KORAN DANKON!

La Centra Estraro de BEA, la redakcio de „Bulgara Esperantisto“ kaj la Internacia Esperanto-Kursejo kore dankas al ĉiuj geamikoj-esperantistoj, kiuj sendis siajn bondezirojn okaze de la nova 1982 jaro.

Al ĉiuj, kiuj ĝis nun kunlaboris al „Bulgara Esperantisto“ per artikoloj, rakontoj, versaĵoj, eseoj, korespondadoj, enigmoj, fotoj ktp., ni sincere dankas, esperante, ke ili ankaŭ dum la nova jaro daŭrigos sian valoran kunlaboradon. Anticipe ni dankas ankaŭ tiujn, kiuj estonte kontribuos por la plibonigo kaj varigo de nia revuo — unu el la plej malnovaj E-eldonaĵoj en la mondo.

Redakta komitato

Donĉo ĤITROV (ĉefredaktoro), Marin BACEV, Vasil BOROVIANSKI, Prof. Vasil ĈOĈOV, Dimitar ĤAGIEV, Krastju KARUCIN, Ĥaim LEVI (vicĉefredaktoro), Flori NIKOLOV, Lidia RAEVA.

Administranto: Kalinka VASILEVA

NIAJ PERANTOJ

Britio, Covenham Louth, Lincs. LN11 0PF
„Lavercroft“, Main Road, s-ro Paul Hewitt
Jarabono 2.50 f. ster.

Ĉeĥoslovakio. Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská 10, 11000 Praha 1. Jarabono: 5 us. dol. aŭ egalvaloro.

Ĉeĥoslovakio, 040 01 Košice, Šmermova 35/1, Esperantisto Slovaka, Daniel Papak.

Danlando. Torholmsvej 23, 9800 Hjørring
s-ro J. H. Eriksen
Poŝtkonto 1 48 39 51
Jarabono 37,98 kr.

Francio. F-54510 Tomblaine, B. P. 23,
s-ro Roger Degrelle
ĝirkonto 771.77 R. NANCY
Jarabono 20. — f. f.

Finnlando. PL 221, SF — 70101, Kuopio 10,
Finna Esperanto-librejo
Jarabono 24 fmk.

Germana Demokratia Respubliko,
108 Berlin, Charlottenstr. 60,
D-r Esperantist
Centra Laborrondo Esperanto

Germana Fed. Respubliko, Esperanto-eldonejo Palatina
Iggelbach, Schlossgasse 30, poŝtekonto n-ro 1658
48-678 ISHN D-6731 Elmstein
Jarabono: 8 gmk

Hispanio, Adonis Gonzalez Meana
str. Marcelino González, 5-4º-doh.
Gijón (Asturias)
Jarabono: 300 pesetoj

Hungario, „Budapeŝta Informilo“, p.k. 153, H-1443 Budapest

Japanio. F-ino Fukiko Mashimo,
1-134-19, Nakarai, Tokorozawa-shi,
Saitama-ken 359, Japan

Kubo, Ciego de Avila,
apartado 223, Pedro P. Lamas Díaz

Portugallio, Portugala Esperanto-Asocio, R. DR. Joao Couto, 6 R/C. A P — 1500 Lisboa
Jarabono: 260 esk.

Sovet-Unio, 200016 Tallin, Estonio, do vstrebovanija
Johannes Palu
Jarabono: 5 rubloj

Vjetnamio, Hanoi, 222 Dôl Càn,
Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919,
distingita per ordono „Ĉirio kaj Metodo“ — I grado.
Eldonkvanto 6100.

Adreso de la redakcio:

„BULGARA ESPERANTISTO“

Bul. Ĥristo Botev 97,
1303 Sofio, Bulgario

P. K. 66
1 000 Sofio

tel. 32-40-68, 31-00-29



LA BULGARINOJ RAVIS ĈIUJN

De la 21-a ĝis la 24-a de oktobroj k. en Munkeno okazis la Deka mondĉampioneco de belarta gimnastiko — la unua post la decido de la Internacia Olimpika Komitato (IOK) pri enskribo de la belarta gimnastiko en la programon de la Olimpikaj ludoj.

Laŭ la unuanima opinio de publiko, specialistoj kaj multnombraj jurnalistoj la ĉampioneco estis brila parado de beleco kaj harmonio, poeziplena fantazia vidaĵo, kreita de la belgaj gimnastinoj.

Kaj en la konstelacio de 213 gimnastinoj el 31 landoj la junaj bulgarinoj Anelia Ralenkova, Lili Ignatova kaj Iliana Raeva estigis la „stelojn“, gajninte venkon sur areno, kie por la unuaj lokoj konkuris 21 naciaj teamoj kaj 87 individuaj plenumantinoj.

En la konkuro de multspecaj kombinitaj ekzercoj la unuan lokon gajnis Anelia Ralenkova, kiu ĝis tiu momento okupis rezervan lokon en la bulgara teamo. Tiu ĉi venko estis la senzacio de la Munkena ĉampioneco. Anelia Ralenkova plenrajte estigis absoluta mondĉampionino! La duan lokon okupis,

gajninte egalan nombro da poentoj, Iliana Raeva kaj la debutantino Lili Ignatova. Solene sonis la melodio de la bulgara nacia himno kaj sur la pilcnoj suprenlitis tri bulgaraj flagoj.

En la kombino kun rubando la oran medalon gajnis Lili Ignatova — 19,70 poentoj. La „argento“ akiris Anelia Ralenkova, kiu postrestis nur per 0,10 poentoj, kaj la bronzan medalon gajnis Iliana Raeva kun 19,55 poentoj.

En la ekzercoj kun ŝnureto la unuan lokon okupis Lili Ignatova. Kaj tuj post ŝi viciĝis Ralenkova kaj Raeva.

En la kombinoj kun ringo la unuan lokon gajnis la absoluta mondĉampionino Anelia Ralenkova (19,70 poentoj). La duan lokon okupis Ignatova (19,65 poentoj). La trian lokon en tiu ĉi sportdisciplino la bulgarinoj cedis al sia inda rivalino, la sovetaj gimnastino Irina Devnina, kiu gajnis la bronzan medalon.

Irina Devnina brile plenumis sian ekzercon kun rubando kaj gajnis la oran medalon per 19,70 poentoj. Tio ĉi estis la ununura ĉampiona titolo, kiun niaj „oraj“ junulinoj cedis al la sovetaj sportistino. La duan lokon okupis Iliana Raeva (19,60 poentoj), kaj la trian lokon — Anelia Ralenkova (19,55 poentoj). La kvaran lokon okupis Lili Ignatova.

En la konkluda parto de la ĉampioneco la jurio devis difini la venkinton en grupaj liberaj ekzercoj. Kaj jen la rezulto: la ora medalo kaj la titolo de mondĉampiono estis prijuĝita al la bulgara teamo (38,575 poentoj). La duan lokon okupis la teamo de USSR — 38,350 poentoj, kaj la trian lokon — la teamo de Ĉeĥoslovakio — 38,150 poentoj.

La bulgaraj junulinoj atingis grandegan sukceson, gajninte 5 orajn medalojn (el 6 eblaj), 7 argentajn kaj 2 bronzajn medalojn. Tiu ĉi bonega venko de la bulgaraj sportistinoj estas rezulto de longa obstina sintrenado sub la gvidado de iliaj trejnistinoj, la eksaj mondĉampioninoj Maria Gigova kaj Neŝka Robeva. Kaj ĝi estas ilia donaco por la glora 1300-jara jubileo de Bulgario.

La bulgara registaro alte taksis la brilan sinprezenton de Ralenkova, Ignatova kaj Raeva en tiu ĉi malfacila mondĉampioneco kaj distingis ilin kaj iliajn trejnistinojn per altaj ŝtataj titoloj kaj ordenoj.

ASEN KOLEV